ESPERANTO SUB
LA SUDA KRUCO



Numero 9 [1994/3] — Majo-Junio 1994

Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562, Aŭstralio. ☎ 09 574 1307. Fakso: 09 574 1530.
Presfuŝisto: Odlo Bokserp. Adreso ĉe la redakcio.
Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

EN ĈI TIU NUMERO

Kreskodoloroj (Elvie Rowe) 3
Esperanto jam sukcesas (D.E. Rogers) 4
Krucvortenigmo 7
Ĉu vi povas helpi pri esplorado? (Alan Bishop) 8
Antarktika Esperanto-Asocio fondita 9
Deziras Korespondi 10
Recenzo: *Traduku!* (recenzas Vera Payne) 12
Nia konkurso: La mistera vorto de la jaro 13
L.N.M. Newell, verkisto ne sufiĉe konata (Fay Koppel) 14
Esperanto-programo tutaŭstralia (Svetislav Kanaĉki) 17
Lingva Angulo (Alan Towsey) 18
Surprizo—Espero—Sukceso (Idyss Einihovici) 21
Skribas la legantoj 22
Diversaĵoj 24
Propono pri Esperanto-memortago (Max Wearing) 25
NZEA; kaj Nekrologo: E.W. "Don" Cornes 26
English Supplement

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri..."? Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝerc-desegnaĵon. Vi povas sendi viajn verkojn al ni tajpitajn aŭ sur 3½-colaj diskoj Macintosh aŭ MS-DOS. Se vi sendas manuskripton, bonvolu atenti: la teksto devas esti klare tajpita kun duobla spaco inter la linioj. Tajpu per freŝa rubando sur nur unu flankon de ĉiu folio. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. La redaktoro rajtas konformigi la artikolojn al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto. Laŭbezone artikolo povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro. La publikigo aŭ nepublikigo de artikolo indikas nek aprobon nek malaprobon de ĝia enhavo fare de la redaktoro aŭ de la eldonantaj Asocioj.

Absoluta limdato por ricevo de kontribuoj por la venonta numero: 22 Junio.

KRESKODOLOROJ
DE ELVIE ROWE

Kelkaj jaroj jam pasis. Nia heroino estis preterkreskinta sian ruĝkufulinan vestaron. Ŝia figuro estis supla. Ŝiaj haroj brilis ore. Sed ŝi ne estis feliĉa.

Freda Servito ankaŭ ne estis feliĉa. La vivo fariĝis laciganta rondo plena je ekzerco, dieto kaj plastika kirurgio; sed la ekrigardoj de ŝiaj antaŭaj admirantoj glitis super ŝian ŝultron por priserĉi pli junajn ĉarmojn. Ja tro ofte tiuj ekrigardoj trovis la korpon de ŝia vicfilino.

"Kial mi ŝarĝiĝas per tia stulta infanino?" plendis Freda.

"Mi ne estas infanino," ekkriis la infanino, "kaj neniam nomu min Ruĝkufulino. Mi nomiĝas Dora."

"Aĥ! Stulta Dora! Post ĉio kion mi faris por vi!" Freda rikanis.

La patrino de Dora estis tre feliĉa. Ŝi atingis la pinton de sia ambicio. Ŝi estis naskinta filon. S-ro Lupo ankaŭ estis feliĉa. Nun lia nomo plu daŭros.

Dora sin demandis pri kial estas tiel speciale rilate al ĝuste lia nomo. Ŝi estis rimarkinta ke jam estas tute sufiĉe da lupoj en la mondo.

Ofte ŝi kverelis kun sia patrino.

"Mi ne estas infanino!" ŝi kriis. "Kaj ne nomu min Ruĝkufulino."

"Kion ajn vi preferas, karulino," diris ŝia patrino malatente. "Rigardu, li penas sidiĝi."

Dora vestiĝis kaj ŝminkis la vizaĝon por aspekti pli aĝa ol siaj dek kvin jaroj. Ŝi iris al noktoklubo. Joĉjo ekvidis ŝin tuj kaj paŝumis al ŝia flanko.

"He, Orbuklojo!" li bojis. "Ĉi tiu estas via tago bonŝanca." Tia romantika aliro ekstazigis ŝin. Ili eltrovis multajn spertojn komunajn. Solecan infanecon, nekomprenantajn gepatrojn, la maljustecon de la socio. Kelkaj dancoj, kelkaj trinkaĵoj, kelkaj enspiroj de kanabofumo, kaj ili decidis kune endomiĝi.

Joĉjo laboris nokte. Li estis ia legomisto; en la malantaŭa korto kreskis altega fabkreskaĵo. Kiam li revenis je la fruaj matenhoroj li ĉiam portis oran ovon kiun ili ŝanĝis en sumegon da mono.

Orbuklojo ekiris el la domo baldaŭ post lia hejmalveno. Ŝi, kiu estis bone trejnita de Freda, fariĝis Avon-sinjorino.

Unu matenon ŝi frapis la pordon de la familio Urso, sed oni ne respondis. Ŝi ekrigardis ĉirkaŭ la pordon. La domo ŝajnis senhoma.

"Kiaj strangaj homoj," ŝi pensis kiam ŝi rimarkis ke ili estis lasintaj sian avenkaĉon sur la kuireja tablo. La aromo ebriigis kaj ŝi ankoraŭ ne matenmanĝis.

La kaĉo en la plej granda bovlo gustis tro sala; tiu en la meza ujo tro dolĉa. Ŝi provis la plej malgrandan bovlon—perfekta! Ŝi plenmanĝis ĝin kaj la ceteron en la poto kaj eniris la dormoĉambron. La litoj invitis ŝin kuŝi kaj malstreĉiĝi. Sur la plej malgranda lito ŝi drivis en agrablan revadon.

"Tie ŝi estas! Ŝi ŝtelis nian kaĉon!" La laŭta krio ĝenis Orbuklojon, kiu forpuŝis la furiozajn ursojn

kaj elkuris.

Kiam ŝi eskapis, ŝi votis ŝanĝi sian profesion. Tiu ĉi iĝis danĝera. [*Daŭrigota?*] ❑

ESPERANTO JAM SUKCESAS

DE D.E. ROGERS

Unu el la niĉoj en kiu Esperanto pli kaj pli troviĝas estas la monda komputila reto. Lokaj retoj ligas komputilojn unu al aliaj en la sama domo aŭ en proksimaj domoj. Vastaj retoj interligas komputilojn en la sama urbo aŭ sama lando, kaj la tutmondaj retsistemoj ligas ilin al la mondo per la telefonaj sistemoj. Ili jam servas kelkajn milionojn da uzantoj tra la mondo. Kie troviĝas telefono, tie ankaŭ povas troviĝi komputilo ligita al la monda reto. Originale usonaj universitatoj establis la reton kaj iu ajn rajtas utiligi ĝin.

Kion oni povas akiri per la retoj? Retoj povas provizi informojn, tekstojn, anoncojn, jam eĉ muzikajn, vidbendajn ktp. Eble iuj verkoj ne aperos surpapere, sed nur elektronike. Ĉu Esperanto estos utila al la ĝenerala mondcivitano dependos grandparte de ĉu informo estas havebla en tiu lingvo kaj ĉu tiu informo estas utila al tiu civitano.

La rimedoj alireblaj en Esperanto plejparte konsistas el tri formoj: (1) elektronika poŝto (2) novaĵoj (3) storoj de informaĵo.

(1) Mi ofte utiligas la elektronikan poŝton. Uzantoj de la elektronika poŝto nomas la ordinaran poŝtan sistemon, kiu utiligas kovertojn kaj poŝtmarkojn, "helika poŝto" ĉar mesaĝo sendita per elektronika poŝto povas aperi ĉe la alia flanko de la mondo post nur kelkaj sekundoj aŭ minutoj anstataŭ tagoj aŭ semajnoj.

(2) Unu el la retaj rimedoj kiujn mi ofte utiligas estas la novaĵsistemo de la monda reto "Internet". En la novaĵgrupo pri Esperanto ("soc.culture.Esperanto") oni ricevas ĉirkaŭ 70 mesaĝojn ĉiusemajne kaj ili estas legataj tra la mondo de 25000 personoj, el kiuj la plejmulto almenaŭ iome scipovas Esperanton. Jen kelkaj ekzemploj de la diskutoj okazintaj dum 1993.

Pierre Jelenc opinias ke verki lernolibron estas "tre bona ilo por lerni la fakan lingvon, multe pli bona ol vortaro aŭ vortlisto. La postuloj de librotradukado estas tiaj ke la tradukanto multe pli bone devas trakti la lingvajn/vortajn demandojn ol devas la kompilanto de vortaro. Tial laŭ mi la scienca vorttrezoro de *PIV* estas tiel malbona."

Danielo Albro demandis ĉu en la vortfarado en Esperanto ekzistas sonaranĝaj limigoj? Ĉu vorto kiel "ĝĝusta" povas esti Esperanta vorto? Derek Roff respondis ke Esperanto ja havas tiajn limigojn, kaj ke tia vorto ne povas esti Esperanta vorto. Li skribis ke Esperanto "ricevas vortojn de tre diversaj fontoj, inkluzive de influhavaj stranguloj, kiuj pretas perforti la lingvon. Foje ili sukcesas, sed tre ofte, vortoj en vortaro ne trovas lokon en vera lin-

gvouzo. Tia rifuzo al certaj formoj indikas limojn al mi... La propono 'Buddo' malaperis al la ankoraŭ lama (aŭ ĉu lamaa?) 'Budho'. Esperantistoj rezistas al vortoj komenciĝantaj per 'ŭ'. La sono 'oŭ' ekzistas nur en vortaroj kaj instrulibroj."

Okazas disputoj pri ŝajnaj avantaĝoj kaj malavantaĵoj de diversaj lingvoj. Ofte temas pri la angla, ĉar la plejmulto de la retuzantoj estas usonaj. Iu opinias ke oni ne instruas intonacion en la angla kaj ke intonacio estas tre ofte uzata por distingi diversajn nuancojn. Iu alia kuraĝis konstati ke la angla ordo: subjekto—verbo—objekto estas avantaĝa. Aliaj tuj kontraŭstaris. Iu diris ke la angla havas pli da vortoj ol aliaj lingvoj. Aliaj demandis kio estas vorto? Ĉu oni nombru vortojn same en la germana kie oni emas kunmeti kelkajn vortojn por fari tre longajn?

Ofte aperas kritikoj kontraŭ Esperanto. Paul Andrew Denisowski skribis ke li studis Esperanton dum kelkaj jaroj sed fine forlasis ĝin favore al Interlingua. Li opinias, ke unu el la malsukcesoj de Esperanto estas ĝia movado. Tro da Esperantistoj aŭ vidas sin kiel membrojn de ekskluziva, elita klubo aŭ estas obsedataj de idealoj pri paco/frateco ktp. Ili ignoras ke Esperanto ne venkis, laŭ li.

Ofte okazas diskutoj pri terminoj. Longa pridiskuto okazis pri la demando ĉu Zamenhof estis "judo" aŭ "hebreo"?

Multaj el la uzantoj kiuj sendis la mesaĝojn ne estas tre spertaj pri Esperanto kaj eraroj abundas (multaj estas tajperaroj). Almenaŭ du retuzantoj petis helpon traduki siajn plej amatajn bildstriojn. Tamen kelkaj oftaj uzantoj estas tre spertaj kaj skribas bone kaj interese. Manuel Campagna kritikis la mankojn kaj la enhavon de *PAG* skribante ke ĝi imitis tro serveme la aŭtoritatan francan gramatikon de belgo Maŭrico Grevisa. Ĝi estas tro dika kaj multaj Esperantistoj ne komprenas ĝin. Li citis Lantin, kiu diris ke li neniam estus okupiĝinta pri Esperanto se li estus aŭdinta pri la ekzisto de tia monstro pri Esperanto.

Unu el la sukcesoj de la diskutado en la monda reto estas ke homoj ekscias pri la ekzisto de Esperanto. Multaj komencis lerni la lingvon ĉar ili rimarkis la diskutadon en la novaĵsistemo.

Oni anoncas kursojn kaj aliajn eventojn en Esperantujo. La reta Esperanto-Koresponda Servo ebligas al korespondemuloj trovi aliajn tiajn aŭ por elektronikaj leteroj aŭ por la eksmoda "helika poŝta". La Lingva Servo rete korektas mallongajn Esperantajn tekstojn de iu kiu deziras tion. La novaĵsistemo permesas rapidan reagon al iu evento. Ekzemple Don Harlow (ELNA) avertis pri artikolo kontraŭ Esperanto en *New York Times* kaj kelkaj Esperantistoj en New York alŝutis leterojn (per helika poŝto) al tiu ĵurnalo. (3) Komputilaj storoj en diversaj landoj provizas programojn, lernilojn, vortlistojn, kaj artikolojn en kaj pri Esperanto, eĉ diĝitan bildon de Zamenhof.

Senpagaj kursoj por anglalingvanoj, franclingvanoj, germanlingvanoj kaj nederlandanoj estas haveblaj per la reto.

Ankaŭ haveblaj estas listo de rete atingeblaj Esperantistoj, kaj la tiel nomitaj flavaj paĝoj de Esper-

anto, kiuj listigas la servojn haveblajn per la reto.

La sukceso de Esperanto per la monda reto estas nur unu ekzemplo de desuba progreso. Desupraj atingoj estas malpli facile troveblaj sed jen unu, pri kiu mi legis en la retnovaĵoj (kaj en *Esperanto*).

En septembro 1993 en Bruselo okazis unutaga simpozio pri la lingva problemo. Ĉi tiu estis la unua fojo kiam la eŭropa komunumo oficiale agnoskis planlingvojn kiel almenaŭ pripensindan realaĵon. Ĉeestis eŭropaj parlamentanoj kaj oficistoj. Oni diskutis la aplikeblecon de planlingvoj ene de la lingvo-politiko de la EK. Profesiajn kaj konvinkajn prelegojn prezentis C. Piron, D. Blanke, K. Schubert, H. Frank kaj aliaj. Kiel kutime la oficialuloj de EK elbuŝigis la ortodoksajn ideojn, ke la plurlingva funkciado de la EK ne estas tro multekosta, kaj oni instigu la civitanojn lerni du-tri lingvojn, ne gravas kiujn...

Krom tio la Radikala Partio, kiu de tempo al tempo sendas al ni profesinivelajn broŝurojn, instigis projektojn pri instruado de Esperanto en bazlernejoj en Belgio kaj Italio.

Kiel tro ofte en la pasinteco ni vidas ke la desupra vojo ne donas grandan progreson.


Do ni povas konstati ke, malgraŭ la manko de desupra subteno, la lingvo Esperanto jam estas vaste uzata de miloj da homoj tra la mondo ĉiutage por komuniki trans la lingvaj baroj. Pro tio ni povas kludi ke Esperanto jam sukcesas kaj tiun sukceson oni povas mezuri laŭ la nombro kaj la kvalito de la komunikoj.

Mi opinias ke la koncepto de "la fina venko" de Esperanto ne estas helpa. Ĝi havas preskaŭ religian aspekton (ne maltrankviliĝu pri la manko de sukceso en la nuna mondo—ĉio estos ideala en la postvivo). Ne estas realisme atendi ke ĉiu homo en la mondo scipovu Esperanton, eĉ post mil jaroj. Ni konsideru pli realisman koncepton: "laŭgrada venko" aŭ pli bone "laŭgrada progreso".

Homoj, precipe triamondanoj, ĝenerale provas lerni la anglan lingvon por utiligi ĝin por praktikaj celoj, gajni vivrimedojn. Se ni atendas ke ili lernu Esperanton, ili atendas praktikajn avantaĝojn. Por realigi tiujn avantaĝojn ni devas evoluigi ilin. La plej bona kaj natura vojo al tiu celo estas utiligi la jam ekzistantajn praktikajn rimedojn. Se ni faros tion, la ekzistantaj rimedoj plu evoluos kaj novaj aperos. Tia estas laŭgrada progreso.

P.S. Mi verkis ĉi tiun artikolon antaŭ ol mi ricevis la decembran numeron de *Esperanto* en kiu aperis artikolo de Sylvan Zaft (p. 208-9). Li mallonge traktas pri la "venonta venko" laŭ la filozofio de metaforoj. Kvankam mi konsentas ke estas pli konsilinde uzi lian metaforon de "Esperantokreskigado", bedaŭrinde li ne prezentis praktikajn rimedojn por atingi tiun celon.❑

La nova *Esperanto-Katalogo* de UEA estas akirebla ĉe UEA je 14 guldenoj (≈$10 inkl. marpoŝtsendon). Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



Se vi sukcesis solvi la pasintnumeran krucvorton, vi povas gratuli vin, ĉar ĝi estis la plej malfacila ĝis nun. Ĉi-foje ni aperigas pli facilan enigmon kun aktuala temo.

Jen solvo de la pasintnumera krucvorto:

Horizontale: 1. kajako; 2. nek / remi / ree; 3. araneaĵo; 4. stop / bona / nano; 5. estri / jodli; 6. bati / enui; 7. malbonŝancoj; 8. aloo / eako; 9. poleno; 10. diras / eliri; 11. tlaspo; 12. jaro / ogro.

Vertikale: 1. unuteama; 2. ostalgioj; 3. kaptilo; 4. bopatro; 5. arabino / Oslo; 6. jeno; 7. amen; 8. kiaajna / nepo; 9. neologo; 10. rondeca; 11. alnokargo; 12. peoniujo.

Ilkka Santtila

Represita laŭ afabla permeso de la aŭtoro kaj de *Esperantolehti.*

ĈU VI POVAS HELPI PRI ESPLORADO?

DE ALAN J. BISHOP

Dum la AEA Kongreso en Adelajdo, grupo renkontiĝis por diskuti eblan projekton pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kiel "pontlingvo" por lerni aziajn lingvojn.

Post la entuziasma kaj interesa diskuto, grupeto en Melburno preparas proponon por sendi al la estraro de AEA pri subtenado de la unua parto de la projekto.

La penso kiu naskis ĉi-tiun projekton estas:

1) Ni, kiel multaj esperantistoj, deziras vidi Esperanton instruatan en lernejoj, pro multaj kialoj

2) Tamen ekzistas multaj kontraŭuloj, kiel:

•la registaroj—kiuj havas aliajn prioritatojn,

•la anglan instruanta "mafioso"[1] —kiu deziras ke la angla estu la sola internacia lingvo,

•La LOTE instruanta "mafioso" (LOTE = Languages Other Than English)—kiu konsideras Esperanton kiel rangminacon,

•la nesciemuloj.

3) Ekzistas du ĉefaj kialoj por la instruado de Esperanto en lernejoj:

•por disvolvi internacian komprenadon; uzi la lingvon en aliaj landoj; korespondi; ktp.

•kiel pontlingvo por lerni aliajn etnajn lingvojn.

4) La duan kialon ni penas subteni, ĉar unue ĝi estas bona bazo por disputoj kun la LOTE kolegoj, kun kiuj necesas kunlabori. Aldone kaj pli grave ni opinias ke se ni povos montri kiel la instruado de Esperanto helpas la lernadon de kelkaj aziaj lingvoj, registaranoj multe interesiĝos pri ĝi.

5) Jam ekzistas atesto (Symoens, 1992) ke Esperanto povas sukcesi kiel pontlingvo por lerni certajn eŭropajn lingvojn. Sed, laŭ nia scio, nenia esploro estas farita pri la efekto de la antaŭlernado de Esperanto por lerni iun-ajn azian lingvon. Espereble ni povas persvadi komisiitojn de fondusoj, registarajn funkciulojn, ktp. subteni ĉi tian esploron.

Do, nia strategio por ĉi tiu unua esploro estas:

(1) trovi kiom eble plej multajn lernejojn, kie oni instruas Esperanton, aparte unuagradajn lernejojn,

(2) dokumenti kian kaj kiom da instruado okazis kaj okazas,

(3) dokumenti la lingvan progreson de la lernantoj, aparte kiam ili penas lerni azian lingvon,

(4) informi ĉiujn interesatojn pri la rezultoj en *ESK*, ktp.

(5) kaj prepari samtempe plidetalajn proponojn pri aliaj similaj esploroj.

Ĉu vi povas helpi nin? Se vi konas lernejon kie Esperanto estas instruata, bonvolu informi min, kaj sendu al mi sufiĉajn detalojn por ebligi kontakton kun la instruistoj.

Aldone, se vi, aŭ iu alia samideano, volas partopreni aŭ helpi nin pri ĉi tiu esploro, mi bonvenigos informon. Ju pli da helpantoj, ins-

[1]Mafia. [Ne en *PIV*]—Red.

truistoj, dokumentantoj ktp. ni povos kuntreni, des pli da eblecoj evoluos por la lernado de Esperanto.


Mia adreso estas:
Profesoro Alan Bishop
Faculty of Education
Monash University
Clayton, Victoria 3168
Telefono: (03) 905 2772
Fakso: (03) 905 3668

BIBLIOGRAFIO

E. Symoens: *Al nova internacia lingvopolitiko: la propedeŭtika valoro de Esperanto.* Esperanto-Dokumento 28-29E, UEA, Rotterdam 1992. ❑

ANTARKTIKA ESPERANTO-ASOCIO FONDITA

SPECIALA RAPORTO DE ODLO BOKSERP



La 1an de aprilo oficiale fondiĝis la Antarktika Esperanto-Asocio, kun fondmembraro de 78 anoj.

Pro la izoliteco de Antarktiko, malmultaj esperantistoj scias ke Esperanto atingis la loĝantojn de tiu kontinento jam en 1908, kiam vojaĝanta episkopo instruis ĝin al siaj novaj konvertitoj. (Por detaloj, vidu la tiutempan raporton de Anatole France.) La nova A.E.A. deziras aliĝi al UEA, sed kurzproblemo—la konvertado de la loka valuto eŭfaŭstioj (*Euphaustiidae*) en nederlandajn guldenojn—ankoraŭ ne estas solvita.


La prezidanto de la nova asocio, P. Grizventrulo, en sia malferma parolado diris ke la nova asocio havos speciale koran ligon kun la aŭstralia asocio, ĉar Aŭstralio mastras proksimume trionon de tiu kontinento. "Tamen en Antarktiko troviĝas civitanoj de multaj landoj," li diris, "kaj ĝis nun la problemo de interkomunikado malebligis kunlaboron por formi nian propran nacion. La jaro venos—ĝi venos baldaŭ!—kiam ni ĉesos esti aŭstralia kolonio kaj fariĝos fiere sendependa kun Esperanto kiel nia indiĝena lingvo!"

Kiam la klakaplaŭdado ĉesis, li daŭrigis: "Kun pli da indiĝenaj loĝantoj ol la tuta loĝantaro de Aŭstralio kaj Nov-Zelando kombinitaj, kaj troviĝante tuj sub la Suda Kruco, ni la antarktika Esperantistaro mirigos la mondon kaj, mi aŭdacas diri, la futuro estos nia!"

Post la formala kunveno, la grupo piknikis, kaj amikeme konversaciis kun David Attenborough, kies sesparta televidfilmserio pri la nova Asocio estis dissendata ĉiuĵaŭde de la ABC en Aŭstralio dum marto-majo ĉijare. David, kiu dum 14 monatoj helplaboradis por kunkonigi la indiĝenojn kaj establi la novan asocion, ricevis specialan honormedalionon.

La nova asocio planas eldoni propran revuon, *La Verda Pingveno*, kiam ĝi sukcesos akiri komputilon kapablan funkcii je -60°C. ❑

PLI ALLOGA FOTO



Pluraj niaj legantoj plendis ke nia foto de nia kolego-kontribuinto Diplodoko en nia lasta numero (Marto-Aprilo, p.3) ne estis tre flata, eĉ efektive estis malflata. Amiko ŝ/lia bonvolis provizi al ni foton el ties juneco, kiun ni volonte publikigas ĉi tie. ❑

Deziras Korespondi

Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428. Se vi deziras korespondi kun persono en la ĉisekva listo, vi povas havigi de nia Korespondservo ties originalan leteron.

// PETRO ENRIKO, p/a Kuba Esperanto-Asocio, PO Box 5120, CU-10500 La Habana, Kubo. 32jara; komuniko-inĝeniero, partoprenas Esperanto-agadon. Interesas kursoj; instruas Esperanton.

// RADAU BETINA, Am Puttkamp 62, 4069 Dusseldoff, Germanio.

// MARVOBARA-NISI, Higaskikiwa-Ku, Ube-Si 755-02, Japanio. 40jara. Interesas korespondado, ĝardenkulturado, internaciaj aferoj.


// JOÃO JOAQUIM CORRAIA DE SCUZA, Rua Riachualo, No 72, Trapiche, Cep, 57010-140 Maceio, Brazilo. 26jara. Idealisto, evangeliisto, homaranisto, fotografisto, amas muzikon.

// OLGA KURCZUK-MAŁYSA, 57-300 Klodzko, Drzymały 44, Pollando. 50jara instruistino.


// FARKAS ANTOL, Str Sovata, 40 BL, Q6 Ap 10, 3700 Oradea, Romanio. 50jara. Kolektas poŝtmarkojn kaj kartojn.

// BARBARA CHODERA, Boh Westerplatte 6/20, 77-400 Zlotôw, Pollando. 42jara. Inĝeniero pri ligna teknologio; interesas vojaĝi, bicikli, libroj, muziko.


DESEGNAĴOJ DE KORESPONDEMAJ INFANOJ




de Victor, 11jara



de Gala, 13jara



de Arthur, 14jara



de Guillaume 18jara

23 januaro 1994

Saluton amikoj! Ni estas du familioj kiuj vivas en kamparo: Eric (1964) kaj Flo (1965) kun du junaj infanoj: Marina (1991) kaj Roberto (1993); kaj senedza virino France (1945) kun kvar infanoj: Guillaume (1976), Arthur (1977), Gala (1981), Victor (1983).

Ni elektis vivi kune ĉar ni pensas simile pri la eduko de infanoj, pri la vivo, pri la senco de la vivo, pri la ekologio.

Ni bredas kaprinojn por la lano. Ni kultivas grandan ĝardenon, ni plantis multajn arbojn, kaj nun ni volas korespondi kun amikoj de la tuta mondo, kaj ni akceptas ĉiujn kiuj volas veni ĉi tien ĉe nia kamparo.

Ni volas korespondi kun familioj aŭ junuloj aŭ edukistoj, aŭ ĉiu persono kiu estas interesita pri la eduko de la homo, ktp.

Flo kaj Eric Bombal kaj France Boué
"La Ramounille"
11230 Peyrefitte du Razès
Francio

TRADUKU!
recenzas Vera Payne

Traduku! Red. William Auld. Private eldonita, 1993. 24p. Akirebla rekte de William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks, Skotlando FK14 7HG. Prezo £1, inkl. afrankon. 50%a rabato kiam oni aĉetas pli ol tri ekzemplerojn samtempe.

"Passages for translation from English into Esperanto appear regularly in *La Brita Esperantisto*, and readers are invited to submit their translations for comment, with a small prize for the best. The feature is guided by the Editor, William Auld. This collection from the series is offered for study by those who would like to extend their grasp of the International language."

Jen la komenco de ĉi tiu instiga libreto, kaj sekvas 14 tradukendaĵoj, post kiuj, la bonegaj solvoj.

Mi ĝojis barakti kun esprimoj kiaj, ekzemple, "to make mowing and trimming a doddle". Nu, al mia "bagatelo" (doddle) W.A. preferis "naivula tasko". Kaj anstataŭ "evitas" (avoids) li dirus "nenecesigas". Mi trovis ke ranunkoloj estas "buttercups" (kaj jes, la kutimaj aŭstraliaj ranunculi inkluzivas "buttercups"). Sed kiel esprimi "butch"? Vi divenu. Troviĝas ne nur la tradukoj sed ankaŭ diskutoj rilate al la eblaj elektoj—aŭ ĉu mi devus diri elektaj ebloj?

Kvankam nur entute 24-paĝa, ĉi tiu ne estas leĝera legaĵo por mense malstreĉi vin. Ĝi estas cerbumiga lernigilo, nepre havinda almenaŭ po unu por ĉiu klubo, por ke oni povu kiel hejmtasko aŭ kiel dumklubkunvena "distraĵo" sin ekzerci en la arto traduki Esperanton. Mi aŭdacas aserti, ke ne necesas akordi kun la solvoj en la libreto. Se pli simpla esprimo pli facile rekonebl-as, miaopinie ĝi estas la pli bona. Ni neniam forgesu, ke la leganto de niaj esprimoj kutime ne havas la "solvon" aŭ eĉ "ŝlosilon" por kontroli ĉu ŝ/li ĝuste komprenis ion. Kelkfoje estas malklare kion oni celas diri eĉ en la propra lingvo. Kion vi komprenus, ekzemple, se mi dirus al vi, "Life's a doddle!"

Averto: por komencantoj *Traduku!* ne taŭgas. Ĝi ne nur estas tro malsimpla por ili, sed aldone al la supra alineo, mi miris legi, ke la angla vorto "corn" signifas en Anglujo "tritiko" kaj en Skotlando "aveno"! [Kaj en Aŭstralio, "corn" ja signifas "maizo"—Red.] Oni ne konfuzu komencantojn.

Tamen, estas vere, ke koncerne tradukadon du (aŭ pli) kapoj pli bonas ol unu, kaj abundas belaj esprimoj.

Ralph Harry ricevas "gernezan"[1]

[1]La angla esprimo estas "to win a guernsey", kio signifas "to succeed, win approval (originally to be selected for a football team)" laŭ la *Macquarie Dictionary*. Aliajn tradukproponojn ni volonte ricevos, laŭ la spirito de la recenzata libro mem. La respondojn ni publikigos,

mencion, pro sia leksikoneto de briĝterminoj.

Intence, mankas paĝo-numeroj. Anstataŭe, la pecoj tradukotaj estas klare (grandcifere) numeritaj 1-14, kaj poste la solvoj ankaŭ, kaj la elektdiskutoj antaŭas la solvojn. La temoj varias, de ĝardenolaboro ĝis pliaĝiĝo; de Romo ĝis Tajvano ĝis Montana (en Usono); de nazoj kaj piedoj ĝis cerbdifektiĝo; de infano-edukado ĝis la angla kiel kumuna lingvo.

Ĉu vi tradukus "the little pisspot" (temas pri viro) "eta pispoto" (kiel mi ja tradukus), aŭ kiel "eta fekulo" (kiel la libreto elektis), aŭ laŭ la Schwartza "eta noktovazo" (kiun preferas W. Auld)? Jen inciteto kiel fino: Traduku: "Much may be accomplished with economy". Feliĉan *Traduku!* adon.

---

kaj *eble* la plej trafa ricevos premion de O.B.—Red. ❑

NIA KONKURSO: LA MISTERA VORTO DE LA JARO

En nia januara numero Odlo Bokserp proponis premion por la plej sprita difino de la vorto "eminagiante" trovita en *Internacia Ĵurnalisto* 4/93. La koncerna frazo tekstis "Eminagiante la premion en Valencio al redaktoro Andrzej Pettyn". Bedaŭrige nur du niaj legantoj partoprenis la konkurson: Pat Harkin: Mi retroigis la literojn, kaj tiel montriĝis ĉi tiu taŭga samideana rezulto—

etna/ig'/anime
ethnic/the causing or bringing about/with soul
"an ethnic cause with soul"

Alan Towsey: "Eminagiante" estas evidente preseraro por "enmanigante" = handing over. Do, laŭvorte "Handing over/Presenting the prize to editor A.P.—or, Springing the prize on editor A.P.—or, Popping the prize into editor A.P.'s surprised hands..."

En *Internacia Ĵurnalisto* mem (1-2/94) Garvan Makaj' proponis:

> "*Eminagiante* ne estas ĝusta Esperanta vorto, sed pseŭdo-Esperantigo—aŭ de la angla verbo *eminagiate* = 'eminentigi dum naĝado'*—aŭ de pluraj japanaj vortoj, nome *e* (bildo); *minami* (sudo); *gi* (afero); *ano* (tiu) kaj *ate* (fido).
>
> *En tiu kunteksto, la aŭtoro supozeble aludas al plaĝo apud Valencio."

Odlo Bokserp aljuĝis la sekretan premion al nia ne-leganto Garvan Makaj' pro lia derivo de la vorto el la "angla" *eminagiate,* kiu montris spritecon ne nur rilate la signifon de la "esperanta" vorto sed ankaŭ rilate la inventon de la "angla" vorto. Gratulojn, Garvan Makaj'! ❑

L.N.M. NEWELL (1902-1968)
VERKISTO NE SUFIĈE KONATA
DE FAY KOPPEL

Prelego de Fay Koppel dum la Nov-Zelanda Esperanto-Kongreso en Aŭklando, januaro 1977. Vera Payne prezentis ĉi tiun saman prelegon al la Kongreso de AEA en Adelajdo, januaro 1994, laŭ peto de Fay. La originalo nun estas en la AEA Biblioteko, kun peto ke ĝi restu en la arkivoj, ne nur ĉar ĝi estas "memore al Len Newell" sed ankaŭ ĉar la eseo estas tributo al la verktalento de Fay Koppel. Tiel AEA omaĝas al du el la plej elstaraj esperantistoj en la historio de la movado en Aŭstralio. [La teksto de la prelego estas iomete mallongigita.]

La nomo "L.N. Newell" estas konata al la kompilinto de la sekvontaj faktoj, ekde la unua konatiĝo kun la lingvo Esperanto. Kiam, komence de februaro 1936, onklino donacis al mi Esperanto-gramatikon, por ke mi komencu la studadon de la lingvo, la lerno-libro, kiun ŝi transdonis, estis *A Concise Course in Esperanto* de L.N. Newell, kaj, sekve, mi trastudis dek kvin lecionojn, antaŭ la komenco de la samjara instruado en la tiama Esperanto-Klubo de Adelaide—tiel facilaj ŝajnis la klarigoj pri la gramatikaj reguloj.

Estis iam en 1958, kiam mi jam loĝis en Viktorio, ke ni aŭdis pri ekloĝo en Suda Aŭstralio de la posedanto de la konata nomo, kaj, kun agrabla ekscitiĝo, en Kristnaska ferio, ni iris al la unua renkontiĝo. Tiu okazis en la hejmo de Ges-roj Fidge. Tie estis prezentita al ni ridetanta, kvietvoĉa, modestaspekta, nur mezalta, iom retiriĝema, sed agrable amikema persono, kiu poste pruviĝis ankaŭ gastama. Ni poste ĝuis plurajn renkontiĝojn aŭ en lia hejmo aŭ en nia, kaj, en la daŭro de unu frua vizito en lia hejmo, mi menciis la deziron de D-ro Caldera, ke mi kandidatiĝu por la Klereca Ekzameno. Ĉiujn eblajn konsilojn li disponigis por mia preparado. Li eĉ riskis perdi la solan restantan ekzempleron de propra verko *Bakŝiŝ*, dufoje pruntedonante tiun por mia legado kaj posta uzado dum la ekzameno. Post mia recenzo pri tiu novelaro, li sendis freŝe verkitajn poemojn por plua ekzercado en tiu fako.

Hontinda nun ŝajnas la konfeso, ke, ĝis nia unua renkontiĝo, mi scias nenion pri li, krom lia verkado de la menciita lernolibro; sed iom post iom, kelkfoje nur hazarde, la historio pri lia giganta laboro malkovriĝis, kvankam kredeble la tuto restas ankoraŭ eltrovenda.

Li naskiĝis en 1902 kaj esperantistiĝis en 1916, je la aĝo 14. S-ro Cecil Goldsmith, iama Sekretario de BEA, UEA kaj AEA, post alveno en Aŭstralio, asertis, ke li ankoraŭ memoras la unuan viziton de Len Newell (14-aĝa ruĝharulo) en la Birminghama Esperanto - Klubo, kun fasko da tradukaĵoj, pri kiuj li deziris opiniojn. Len mem rakontis, ke li komencis traduki la tagon post sia esperantistiĝo. En la jaro 1925/6, li estis Sekretario de la Londona Esperanto-Klubo, kaj en la jaro 1926/27 li estis Vic-prezid-

WITH ONE VOICE
ESPERANTO FOR THE CHILDREN



Heather Bruer and Idyss Einihovici

AUSTRALIAN CHILDREN'S PERPETUAL FUND FOR ESPERANTO EDUCATION AND TRAVEL

A new fund for promoting Esperanto education in Australian primary schools has been established by Idyss Einihovici.

Trustees of the fund are:

J.M. Berinson Q.C. (one-time Attorney General of Western Australia)
Dr I. Raiter (ophthalmologist)
Luke George (Grad. Dip. Bus. Man.)

The origins and reasons for the fund are best expressed in Idyss Einihovici's own words:

"I was born in Warsaw, the capital of Poland. In 1932 I migrated to Italy and I married a Russian Doctor of Medicine. My daughter was born in Italy, but in 1939, prior to the Second World War, we migrated to Australia where we happily settled down, and we feel a tremendous gratitude to Australia.

After many years of working for Esperanto, in 1989 I established a Perpetual Esperanto Travelling Fund for Australian Youth (19-29) years in the name of my late husband Dr Tim Einihovici. To celebrate my ninetieth birthday I have now decided to establish a second fund, an Esperanto international fund for the children of Australia. The fund will be for Esperanto speaking children of Australia between the ages of six and thirteen years. They will represent Australia at the International Children's Esperanto Congress which is held annually in a different country each year. There have been 28 such congresses. The 28th occurred in July 1993 in Valencia, Spain, in which 45 children from 35 countries participated. I was privileged to be there.

During the seven days of the congress the children communicated in one

language: Esperanto. It was an unforgettable sight, and there was a feeling of togetherness and harmony when I spent time with the group. The children's congress is called "Kongreseto", which means "little congress", and is held under the auspices of four international teachers. I have brought back photos of the children participating in many group activities. I also took the liberty of taping the children singing and reciting in Esperanto.

Unfortunately, to my great sorrow and regret, Australia was not represented. This is of great concern to me.

The ethos of the children's togetherness greatly inspired me, and I feel that through their knowledge of Esperanto they will have enhanced their potential. From my own life experiences I have realised the need for an Esperanto International Perpetual Fund to enable children from Australia to be a part of the togetherness and participate in making the world a better place to live in through one second common language. Children are our future; it is vital that we enable them to make the best use of their enthusiasm and creativity. By teaching them Esperanto we help them to become productive citizens of the world.

It is my greatest hope that in the short time I have left to live, I will see a representative of our future generations at the next congress."

In the light of last year's UNESCO resolution calling upon governments to report on the introduction of Esperanto into their educational systems, we feel that now is the right time to begin an intensive campaign for the introduction of Esperanto in Australian primary schools. This Fund is one part of that campaign.
A founding donation of $6500 has been supplemented by gifts bringing the total so far to just over $9000. We hope that you will see fit to contribute to the fund and thus to the support of the introduction of Esperanto into our schools. Cheques made payable to the *Australian Children's Perpetual Fund for Esperanto Education and Travel* may be forwarded to Yana Bogojev, 73 Newry Street, Floreat Park WA 6014, Australia.

LETTER FROM JUSTICE KEPPEL ENDERBY TO SENATOR GARETH EVANS

22 March 1994

Dear Gareth,

You may remember that somewhere in the past, and long after my departure from politics, I mentioned to you my interest in the international language Esperanto. We did not discuss it at any length although I remember your telling me of your long standing interest in languages and your feeling that the time of Esperanto may have passed with the present day widespread use of English.

I am writing to ask a favour.

I am now the President of the Australian Esperanto Association and there is an article in the last issue of its journal, *Esperanto sub la Suda Kruco*, [you don't have to be an Esperantist to work out what that means] that has prompted this letter. It relates Esperanto and U.N.E.S.C.O.

My understanding is that in 1954, in Montevideo, U.N.E.S.C.O. passed a resolution in which it noted the presentation of an international petition urging the use of Esperanto; that the results attained by Esperanto correspond to the aims and ideals of U.N.E.S.C.O.; and in which it asked Member States to report on their readiness to introduce Esperanto into their schools or institutions of higher learning; and to inform the Director General of the results of their activity.

My further understanding is that there was a similar resolution passed in 1985, this time in Sofia, in which U.N.E.S.C.O. noted the forthcoming [1987] centenary of Esperanto; invited international non-governmental organisations to study the possibility of using Esperanto to disseminate information among their members; and invited Member States to introduce Esperanto study programmes and studies of the language problem in their schools and institutions of higher learning.

The article in *Esperanto sub la Suda Kruco* states that there was a further resolution last year. This 1993 resolution requested the Director General of U.N.E.S.C.O. to consider the results of the Esperanto movement in relation to the preparation of teaching programmes, training of teachers and new activities in the areas of education for international understanding, peace, human rights and democracy, and to present these results in the Handbook to be published on guiding principles for the communication of the values of peace. And it asks the Member States to report on their actions undertaken as a result of the 1985 resolution, particularly in relation to Esperanto study programmes and their results.

The favour I ask is, can you help me, and through me other Esperantists in Australia, to know a little more about what has been happening, if anything, as a consequence of these resolutions? Were replies sent to U.N.E.S.C.O? If so, what was said? Has any Australian Government or other Government for that matter, since 1954, stated an attitude or done anything?

I do hope you can help, although I have to say I will be out of Australia for the next five months...Because of my being away, I wonder if you could send a copy of anything you are able to tell me to the editor of *Esperanto sub la Suda Kruco.* Whatever be the reply or the answers, I am sure that they would be of great interest to other Esperantists generally.

[Editor's note: Senator Gareth Evans is Australian Minister for Foreign Affairs. Keppel Enderby is one-time Attorney General of Australia and a retired justice of the NSW Supreme Court. As of April 27 no reply had been received from Senator Evans.]

SUMMER SCHOOL 1995 : TEACHING AS A BASIS FOR THE SPREADING OF OUR LANGUAGE

by Max Wearing

The Australian Esperanto Summer School to be held in Adelaide in January 1995 already promises to be the most outstanding so far. After presenting extremely successful courses at levels 1 and 4 in past schools, Vera Payne will be offering courses at the two remaining levels: 2 and 3. Trevor Steele has undertaken levels 2 and 4 again, as he did in 1994, while Donald Broadribb will be offering level 3 and level 4 linguistics courses containing subject matter that has not yet been presented—at least in this country.

In addition to these local riches, the 1995 school will offer direct-method lessons for beginners along with a course in teaching methods (for practising and prospective teachers of Esperanto), to be taken by Atiljo Orellana Rojas, undoubtedly the teacher now most sought after by UEA (Universala Esperanto-Asocio) for introducing Esperanto into communities where there has not been a long tradition of the language and its culture.

Until recently a teacher of Russian language and literature in the University of Córdoba in his home country, Argentina, Atiljo has now undertaken full-time direct-method teaching of Esperanto. At present he is doing an Esperanto teaching tour of South American countries. Later this month he will teach Esperanto in Korea, right up till the Universala Kongreso and the Konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj) at which he will be giving demonstration lessons in the Cseh method. After those events he will teach Esperanto in Sweden for the month of September. He will then teach Esperanto in African countries until the beginning of January, 1995, when he comes to Adelaide for the Australian Esperanto Summer School.

As he has not yet made any fixed commitment to teach in another country after the end of January, we may have a chance of booking him for lectures and teacher training courses in Australia after the end of the Summer School. Would any individual or group interested in engaging his services for those purposes please let me know as soon as possible?

Rojas is still in his early thirties, the age when Father Cseh and Lydia Zamenhof did their most memorable work in attracting literally thousands of people to demonstration lessons in public places and following these with intensive direct-method courses (often for multilingual groups), thus attracting the favourable attention of education authorities in a number of different countries and gaining the commitment of hundreds of new Esperantists. Though not of imposing height (he is in fact quite small), Rojas instantly appeals with his Spanish-Italian appearance, a pleasant manner, keen intelligence and sound teaching technique.

Cseh used to say that teaching is the very basis of spreading our international language. The time has come for us to focus on its potential in this country.

anto. Inter 1925 kaj 1930 li estis Ĉefredaktoro de *International Language*, kaj inter 1926 kaj 1931 membro de administra kaj aliaj komitatoj. En 1930 li estis kunarangînto de la 22a Universala Kongreso en Oxford, kaj, en 1932, Ĝenerala Sekretario de la 24a en Parizo. (Kredeble, tiam li eksentis la grandan amon por tiu urbo, poste esprimitan en la tre bela poemo "Parizo".) Li laboris por Esperanto ankaŭ en Egiptio, el kiu lando li ĉerpis materialon por la novelaro *Bakŝiŝ*.

Krom *A Concise Course in Esperanto* li verkis "Preskodo de Esperanto"n, kaj multajn recenzojn, novelojn kaj poemojn, kiuj aperis en la gazetoj *International Language*, *Literatura Mondo*, *Heroldo de Esperanto* kaj aliaj. Liaj ĉefaj interesoj estis la homo kaj la literaturo.

Skribante pri la evoluo de la Esperanto-poezio, en sia Enkonduko al la *Esperanta Antologio*, William Auld emfazis la gravecon, en ties dua periodo, de la eta poemkolekto—*Dek Du Poetoj*—kiu aperis en 1934. Unu el tiuj dek du verkistoj estis L.N. Newell. Jen kiel Kalocsay taksis lian kontribuon:—mi ne citos la tuton, kompreneble, nur la finan resumon:

"Kvin poemoj—kvin sferoj. Sed ĉiuj kvin artebrile perfektaj en sia speco. Juveloj. Ne multaj. Sed ankaŭ la konko ne produktas multajn perlojn."

En la eldonaĵo de D-ro Lapenna, *La Internacia Lingvo*, mi trovis la aludon al la jam menciita *Bakŝiŝ*, kiu unue vekis mian apetiton por tiu "novelaro de unuaranga kvalito, konsistanta el skizoj pri la vivo de egiptoj."

Len mem informis nin pri sia okupiteco rilate la novan tradukon de *Hamleto*. Multaj jam scias, ke tiu mamuta tasko, kiun li entreprenis kaj finis en Adelaide, valoras preskaŭ egale pro sia mirinda, plendetala enkonduka analizo pri la mondfama ŝekspira tragedio, kiel pro la tradukaĵo mem, samtempe poezia kaj multe pli fidela laŭ teksto ol la Zamenhofa.

Dume, de tempo al tempo, aperis recenzoj, poemoj kaj aliaj tradukaĵoj: En unu numero de la gazeto *Nica Literatura Revuo* troviĝas lia recenzo pri traduko de ankoraŭ unu ŝekspira tragedio—*Otelo*—fare de Reto Rossetti. En unu numero de *Norda Prismo* aperas lia tradukaĵo de "Balado de l'Prizono Reading", verkita originale de Oscar Wilde; kaj en numero de *Esperanto* longa recenzo pri la poemkolekto de Edwin de Kock—*Ombroj de la Kvara Dimensio*.

En januaro 1968 li prelegis laŭ la temo "Verkisto kritikas sian verkon", uzante aron da propraj poemoj, kiujn li disdonis al la ĉeestantoj de la AEA-Kongreso.

Kredeble, en ĉio menciita troviĝas nur fragmentoj de lia tuta laboro.

Unu memoro pri li, kiu elstaras en la memoro, estas la okazo, kiam certa puŝema sinjoro, kies senĉesa zorgado pri la organizo de la Movado en Aŭstralio ĉiam aktivis, deziris instigi Len al sama laboro. Tre ĝentile, kvietvoĉe, kaj preskaŭ pardonpete, sed firme, Len respondis, "Mi havas nur du talentojn—la instruadon kaj la verkadon. Ili plene okupas min." Sed kiaj talentoj tiuj estis! Kaj ĝis kia grado li ekspluatis

ilin por la bona progreso kaj de la studentoj kaj de la lingvo!

Profesie, kaj en Egiptio kaj en Aŭstralio, li estis instruisto pri la anglaj lingvo kaj literaturo. Aŭskultante lin priparoli sian laboron, iam dum gastiĝo ĉe li, mi konstatis kiel sindediĉe li plenumis sian oficon, kaj venis al mi la penso, "Kia privilegio studi la literaturon, precipe la poezion, sub lia kapabla gvidado!" Tiu laboro instigis lin verki kelkajn librojn por lernejanoj. Se oni povas juĝi laŭ unu tre ampleksa kaj utila konsult-libro—*Aids to Appreciation*—tiuj verkoj konsistigos verajn helpbastonojn por stumblantaj studentoj de la literaturo. Unu, kiu eldoniĝis antaŭ lia forveturo de Aŭstralio en februaro 1968, estis jam la dua. La tria estis prespreta antaŭ lia forveturo, kaj unu alian li finis en Eŭropo. Ankoraŭ aliajn li planis, sed la sorto fuŝis liajn planojn.

Ekster la lernejaj horoj, li instruis Esperanton kaj gvidis rondon de Adelajdanoj en la tradukado. Krome, kiam D-ro Caldera demisiis kiel Ĉefekzamenisto, Len Newell transprenis tiun oficon por AEA, kaj plenumis ĉiujn devojn ĝis sia forveturo. Transdoninte la oficon al S-ro Banham, li kredis tion portempa, sed ankaŭ pri tio la sorto decidis.

Ŝajne li neniam ripozis. Kiam li ne instruis, aŭ plenumis taskon ekzamenistan, li daŭre verkis aŭ tradukis. Pli taŭgan monumenton memore al sia nomo li ne bezonas ol konsistigas liaj grandaj, altnivelaj kontribuoj al la literaturoj nacia kaj precipe internacia.

Gesinjoroj Newell restis preskaŭ jaron en la norda hemisfero. Ili jam aranĝis komenci la veturon reen al Sudaŭstralio je la 10a de novembro. Dum S-ino Newell restis kun filino loĝanta en norda Italio, Len faris duan, mallongan viziton al parencoj en Anglio. Revenante, li komencis la lastan etapon de la vojaĝo al reunuiĝo kun sia edzino en trajno en Parizo. Mallongan distancon el tiu amata urbo, konduktoro trairis la trajnon por kontroli biletojn. Kiam li alproksimiĝis al Len, li kredis, ke tiu pasaĝero, komencinte legi libron, endormiĝis kaj tiel faligis sian libron. Bedaŭrinde, evidentiĝis, ke Len ne plu vivas.

S-ino Newell devis iri al Parizo por aranĝi la lastajn formalaĵojn pri la korpo de sia edzo, kaj ŝi spertis malfacilojn, pri kiuj ŝi petis helpon de la brita Ambasadoro, kiu informis ŝin, ke, ĉar Len estis Majoro en la Brita Armeo, li rajtis enteriĝi en la Père La Chaise Tombejo, apude al Parizo. Do tiel estis aranĝite, kaj poste ŝi skribis al la frato de Len por informi lin, esprimante la esperon, ke tio ne malplaĉos al li. La frato respondis al ŝi:

"Kiel strange, ke Len nun kuŝas tie! Antaŭ jaroj ni kune vizitis la lokon, kaj Len estis tiel impresita de la etoso, ke li esprimis deziron, ke ankaŭ li povu enteriĝi tie."


Do, tiel strange profetaj pruviĝis la finaj emfazaj vortoj de la poemo "Parizo":

Sed komprenu, anĝelar':
Post morto min atendos Paradizo,
Sed iros al ĉiel' nur ŝelo—ĉar...
Mi lasos mian koron en Parizo.

❑

ESPERANTO-PROGRAMO TUTAŬSTRALIA

MESAĜO DE SVETISLAV KANAĈKI



Jen la detaloj: dum la AEA kongreso kiam mi prezentis mian paroladon, pluraj el vi demandis min ĉu ni povas sendi niajn kasedojn al tiuj kiuj deziras aŭskulti nian programon. Mi respondis ke jes, sed mi petis ke vi sendu kasedon kun afrankita resendkoverto. Jen kion mi kaj Jeni faras niaflanke: Mi demandis nian Direktoron pri la ebleco iamaniere esti en kontakto kun aliaj similaj radiostacioj, ke ni interŝanĝu programojn simile kiel jam nun kun Pollando, Vieno kaj Pekino. La respondo estis ke li informiĝos kaj respondos al ni. Post kelkaj tagoj ni ricevis respondon ke estas ebleco: ke ni sendu al la radiostacioj *resumon* pri nia programo kaj la temo pri kiu ni parolas, ĉar ekzemple en Sidnejo en radio-stacio oni ne scias ion pri Esperanto, kaj ke ni sendu unu kasedon de nia programo por ke ili ekzamenu ĉu ĝi estas kontentiga por perradia dissendado. Al mia demando kia kosto estos se ni faros tion, la respondo estas ke estos nenia kosto; al demando ĉu la dissendontaj radiostacioj postulos ian enspezon por tio, la respondo estis ke ne.

La aranĝo estas jena: nia radiostacio estas en kontakto kun BBC kaj SBS kaj unu alia, kiuj havas anten-telerojn per kiuj niaj programoj estos sendataj kaj ĉiuj komunumaj radiostacioj povos transpreni ilin kaj dissendi ilin laŭ siaj frekvencoj, kio samtempe helpos al tiuj radiostacioj. Iuj akceptos volonte kaj aliaj devos esti persvaditaj pri la bezono je tiu lingvoprogramo. Ĉirilate rolas **vi**: ni postulas de vi ke vi skribu al nia radiostacio peton enkonduki tiun sistemon, kaj samptempe ankaŭ skribu al la komunuma radiostacio kiu estas en via regiono. Mi sendos al vi poste nomojn kaj telefonnumerojn de tiuj radiostacioj.

Nun, por plibonigi niajn programojn kvalite, enhave, kaj rilate al longeco, ni bezonas vian helpon, ĉar ni devos kompili programon kiu taŭgas por la tuta Aŭstralio kaj kontentigos tiujn aliajn staciojn kaj la aŭskultantojn, ĉu ne? Do, karaj samideanoj, helpu nin por ke ni helpu vin. Por vi estos neniu kosto (krom se vi volos helpi nin por niaj elspezoj, kaj se vi faros donacojn al nia radiostacio kiam ni havos *Radiotonon.*) Mi atendas vian respondon.

3.ZZZ Esperanto-Programo
PO Box 1106
Collingwood Vic 3066
Aŭstralio ❑



LINGVA ANGULO
de ALAN TOWSEY

TOPLESS/SPEED HUMP

Dudley Parkinson proponas "subvestita/malrapidigilo". Ambaŭ ŝajnas al mi iom dubesencaj. David Rockell preferas "nudbrusta". Jukka Pietiläinen el Finnlando skribas: "La tradukproponoj por *topless* estas brilaj. Mi preferus 'nudmama' (ĝuste, ĉar laŭ mia scio 'topless' aludas ĝuste al virinoj), kvankam ankaŭ 'nudtorsa' ricevus mian subtenon. 'Speed hump' superas mian konon de la angla."

**Diskuto pri la traduko de ĉi tiuj vortoj nun estas finita.*

(Laŭ Alan Peterson en *The Sydney Morning Herald* de 26 februaro, Okcident-Aŭstralianoj nomas "speed hump" ***rumble step***, kaj Nov-Zelandanoj nomas ĝin ***judder bar***. Ĉu vere?[1])

David Rockell skribas plue: "Dum la NZEA Kongreso en Aŭklando, pro la neatendita neceso rapide trovi vorton, ni uzis 'sunŝirmilo' por la angla 'sun-screen lotion'. Post pripensado, mi nun kredas, ke tio signifas objekton kiel 'parasol', 'awning', 'sun-visor', kaj ke la ĝusta esprimo estas 'sunŝirma kremo' aŭ 'sunŝirmaĵo'. Ĉu vi konsentas?"

Persone, jes! Sed kion pensas aliaj?

Kaj jen nova defio: kiel traduki: *working bee*? kaj *ringabout* (fund-raising exercise by telephone)?[2]

SACRIFICE

Nia ŝatata redaktoro, diskutante kun mi pri ***ofero/oferaĵo*** (*ESK* marto-aprilo 1994) skribis "Pri ***ofero/oferaĵo*** mi ne povas vidi veran diferencon inter la du difinoj donataj en *PIV*, do mi enparentezigis la '-aĵ-' por indiki ke ambaŭ formoj egale eblas."

Mi zorge ekzamenis la ekzemplojn en *PIV*, kaj ŝajnas al mi, ke laŭ la Zamenhofa uzado (kaj la logiko de Esperanto) ***ofero*** rilatas al la *ago*, kaj ***oferaĵo*** al la "objekto, kiun oni oferas; viktimo", se citi la difinon en *PIV*. Pripensu la jenajn (Zamenhofajn) ekzemplojn:

Espero postulas oferon.[3]

La lernado de kiu ajn nacia lingvo postulas grandajn oferojn de tempo

---

[1]La esprimon "rumble step" mi neniam aŭdis nek legis. Laŭ mia sperto ĉiu en Okcidenta Aŭstralia diras "speed hump".—Red.

[2]En sia *Comprehensive English-Esperanto dictionary* Peter Benson proponas "kudra kunveno" por "sewing bee"; do analogie ni havus "laborkunveno" por "working bee", sed tio ne tre kontentigas min. Eble "laborhelpkunveno"? Por "ringabout" eble "distelefonado"? (La angla vorto ekster specifa kunteksto estas nekomprenebla vorto, la proponata esperanta vorto almenaŭ iom pli klaras.)—Red.

[3]*Proverbaro Esperanta* #534.

kaj mono.[Z]

Nenia ofero estus tro granda, se ni povus per ĝi akiri al ni lingvon komune homan.[Z]

Multaj suferoj kaj oferoj.[Z]

Ĉiuj ĉi estas evidente *agoj*, samkiel la sekvanta ekzemplo, kiu laŭdifine rilatas ankaŭ al ago:

Rapidu, ho pastrin', kun la ofero![Z]

La postaj ekzemploj: *brulofero, dankofero, pacofero, pekofero* (= scapegoat) ktp., laŭ mia sento, rilatas pli al agoj, sed laŭ la cirkonstancoj povus ankaŭ esti *bruloferaĵo* ktp. La komenca ekzemplo post *ofero* en *PIV:*

La oferojn, donacatajn al Mi, ili buĉas nur pro viando, por ĝin manĝi, lau *PIV* estas citita el la Malnova Testamento, do supoze tradukita de Zamenhof mem—sed mi ne povas trovi la frazon ie ajn en la Biblio! Ĉiuj miaj konkordancoj silentas pri ĝi.

(Ĉu mi tro rapide serĉis? Ĉu iu povas indiki la ĝustan lokon al mi?)[1]

Kaj pri la sekvanta ekzemplo:

alporti oferojn sur la altarojn,

fonto ne estas indikita. En ambaŭ kazoj mi preferas ***oferaĵojn***.

RESIGN

Antaŭ kelkaj semajnoj mi vidis en iu internacia revuo: "...la tuta regiona registaro rezignis pro la publika premo..." Ŝajne oni volis esprimi la anglan sencon "resigned". Sed la baza signifo de ***rezigni*** estas "forgo, renounce, give up, relinquish, renounce"—laŭ *PIV*: "Definitive forlasi kiel neefektivigeblan aŭ neatingeblan":

rezigni pretendon (= claim—vidu malsupre!), esperon, oficon (a position), rajton, taskon.

Ĉu mi devas rezigni duonon de miaj enspezoj? (*PIV*)

Mi rezignas esti ĝuste komprenata de ili. (*PIV*)

Mi rezignas!—I give up! (kiam la tasko montriĝas neefektivigebla).

La politika senco de "resign" esprimiĝas per ***demisii*** = abdiki (parolante pri elektitaj regantoj aŭ nomitaj oficistoj) (*PIV*). Do:

La registaro demisiis.

rifuzi la demision de policestro.

Notu, ke ***abdiki*** (abdicate) estas baze **transitiva** = formale demeti ĉiujn rajtojn pri reĝeco, imperiestro kaj simile; memvole forlasi altan oficon aŭ rangon:

abdiki la prezidantecon/la tronon.

Por malpli gravaj aferoj, uzu ***eksiĝi***:

Mi volas eksiĝi el la ofico de sekretario de ĉi tiu klubo.

---

[1]Ankaŭ mi tiun specifan frazon ne trovas, kvankam pro la manko de konkordanco de la Esperanta Biblio estas malfacile esti certe. Sed en aliaj tekstoj similaj tradukoj ekzistas. Vidu mian noton pri tio ĉe la fino de ĉi tiu artikolo.—Red.

To resign oneself (to something) = rezignacii (pri):
Ha, mi nun rezignacias, ĉar mi vidas plu nenian rimedon.[Z]
Mi rezignacias pri mia sorto (I resign myself to my fate/am resigned to...).
atendi rezignacie la morton (with resignation)
rezignacio—resignation, uncomplaining endurance/submission.

PRETEND

La ĝusta vorto estas ***ŝajnigi***:
Li ŝajnigas piecon/amon al ŝi.
Li ŝajnigis sin riĉa.[Z] (*PIV*)
Ŝi ŝajnigis sin (esti) malsana.
Ŝi ŝajnigas, ke ŝi ploras.[Z] (*PIV*)
Ni ŝajnigu, kvazaŭ (= ke) ni tute ne scias, kia homo li estas.[Z] (*PIV*).

(Notu, ke Zamenhof uzis ***scias***, ne ***scius***, post ***kvazaŭ***!—Vidu "Lingva Angulo", *ESK* sept.-okt. 1993.)

Ŝiaj sentoj estas pli bonaj, ol kiel ŝi ŝajnigas.[Z] (*PIV*)

Alia similsenca vorto estas ***pretekсti*** (= allege as an excuse):
pretekсti malsaniĝon por rifuzi inviton (*PIV*)
pretekсto—pretext, false excuse (Ŝajna motivo, eldirita por kaŝi la efektivan—*PIV*)
serĉi ĉiajn pretekstojn por nenion fari (*PIV*)
je pretekсto de manko de tempo.
pretekste, ke...—on the pretence that...

pretendi = claim; presume to:
pretendi la rajton fari ion. pretendi la tronon.
Tiaj personoj ĉiam pretendas esti pli saĝaj.[Z] (*PIV*)
Li pretendis, ke li estas granda konanto de la leĝo.[Z] (*PIV*) (claimed that he was...)
La juna pretendanto (al la trono)—The young pretender (to the throne).

NOT YET

En la sama revuo, en kiu mi vidis la misuzon de ***rezigni***, mi ankaŭ vidis:
"Ĉu vi loĝas ĉi tie vian tutan vivon?"
"Ne, sinjoro. ***Ne ankoraŭ!***"
Tio devas esti: "Ankoraŭ ne!"

[Ekzameno de diversaj tekstoj en la Hebrea Biblio kaj la Londona Biblio Esperanta donas kelkajn interesajn informojn pri la uzado de la vorto "ofero". En Amos 5:21-25 tekstas: "Mi malamas, Mi abomenas viajn festojn, kaj Mi ne flaras la oferojn de viaj solenaj tagoj. Kiam vi alportas al Mi

bruloferojn kaj viajn farunoferojn, Mi ne akceptas ilin, kaj viajn grasajn dankoferojn Mi ne rigardas...Ĉu buĉoferojn kaj farunoferojn vi alportadis al Mi en la dezerto dum kvardek jaroj, ho domo de Izrael?" La hebrea teksto laŭvorte diras "mi ne flaras viajn festkunvenojn, ĉar se vi levas al mi brulofer(aĵ)ojn kaj viajn [gren]-donacojn mi ne plezurigas, kaj [la tuton de?] viaj grasbovoj mi ne rigardas....Ĉu buĉaĵojn kaj donacon vi portis al mi en la dezerto kvardek jarojn Domo de Izrael?"

En Miĥa 6:6 la biblitraduko diras "ĉu mi starigu antaŭ Li kun brul-oferoj, kun jaraĝaj bovidoj?"laŭvorte "ĉu mi renkontu lin kun "brulofer-(aĵ)oj" (עולות kiu ĉiam temas en la Malnova Testamento pri specifaj bestoj.) Do klare kvankam Zamenhof ne ĉiam tute laŭvorte tradukis, laŭ la senco de la hebrea originalo lia traduko "ofero" temas pri konkretaĵo, ne ago, en ĉi tiuj tekstoj, kaj eble aliaj.—Red.] ❑

SURPRIZO—ESPERO—SUKCESO
$9 100 EN LA BANKO

Je la 13a de aprilo estis starigita fonduso por nia "grandega projekto":

AUSTRALIAN CHILDREN'S PERPETUAL FUND FOR ESPERANTO EDUCATION AND TRAVEL.

ESPERO POR FUTURA GENERACIO

La banko BankWest en Floreat Park estas nia deponejo kiu gardas nian fonduson sed ni devas nutri ĝin por la plej bona estonteco.

Nia samideanino Jana Bogojev akceptis la rolon de gardistino rilate donacojn.

Bonvolu sendu ĉekojn al ŝia adreso: 73 Newry St, Floreat Park WA 6014.

La kuratoroj de la fonduso estas:

J.M. Berinson, Q.C.
D-ro I. Raiter, oftalmologo
Luke George, Grad.Dip.Bus.Man.


Via subteno estas urĝa por la estonteco de Esperanto en Aŭstralio
Bonvolu donaci malavare

Survoje

el malproksimo malproksimen

Dumonata kultura revuo—unu el la plej elstaraj Esperantaj gazetoj

Petu provekzempleron: UA-335057 Sebastopolo-57, pk 168, Ukrajno
Mendebla per la Libroservo de AEA (≈$35)



SKRIBAS LA LEGANTOJ

LETERO AL LA ESTRARO DE AEA

Mi humile kaj elkore dankas vin pro la granda honoro, kiun vi faris al mi dum la Kongreso en Adelajdo nomante min Fratulo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, pri kio ĵus [Jan. 1994] informis min D-ro Ralph Harry.

Mi bedaŭras, ke, pro familiaj kaŭzoj, mi ne povis ĉeesti persone por ricevi la insignon, sed mia surprizo estis ne malpli granda pro tio!

Mi penos daŭrigi mian laboron por nia kara lingvo tiel longe, kiel mi povos.

Alan Towsey

"KATALUNAJ" "IBEROJ"

Jes, tro naiva estis mi, ripetante dubindan onidiron, ke kelkaj iberaj poetoj estas katalunaj (*ESK* 5 p. 13), eĉ jam sciante, ekzemple, ke Gonçalo Neves estas portugalo. Se li estus prezentinta interesaĵojn pri sia verkado anstataŭ predikojn kontraŭ (ekzemple) Esperanto-propagandantoj, malŝatantoj de vortoj kiaj "mava", kaj de la Esperanto-publiko, kiu ne sufiĉe ŝatas liajn verkojn, mi eble estus aĉetinta *Ibere Libere* por informiĝi pri ties enhavo.

Volonte mi konfesas, ke kiel novulo mi ankoraŭ ne kompetentas recenzi Esperanto-literaturon. Mi tamen spertis multajn aranĝojn, en kiuj verkistoj pli kontentige prezentis sian verkaron al publiko ol faris Neves en la Internacia Literatura Forumo en Barcelono. Eĉ ĉi-monate en fora provinca Adelajdo, angleparolantaj verkistoj prelegis dum 6 tagoj al publiko de 30 000.

Kooperativo de Literatura Foiro jam faris gravegajn Esperanto-iniciativojn per la gazeto *Literatura Foiro,* per *Esperanta Songazeto,* per la vidbendo *Kinarto kaj Ni,* per la rekonigo de Esperanto kiel literatura lingvo (pere de PEN) kaj per Internacia Literatura Forumo. Mi ne dubas, ke en la estonteco la nomoj de ĝiaj fondintoj estos tiel same honorataj kiel nomoj kiaj Privat kaj Hodler. Ĉu Neves estos same honorata kiel Baghy?

Max Wearing

PROTESTO

Kvankam vi donis al S-ro Kamaĉo la oportunon repliki al la akuzo ke li mensoge disvastigis la famon, ke nia forpasinta samideano Jozefo Major komplotis murdi lin, li ne respondis sed nur aldonis novajn malveraĵojn. Ŝajne li deziras kredigi, ke la uzo de la t.n. "malmilda" esprimo "intelektula snobo" sufiĉas por meriti tiun naŭzigan naziecan atakon kontraŭ mortanto. Kamaĉo provas profiti el la eblo ke ne ĉiu leganto de *Esperanto sub la Suda Kruco* legis la Nov-Zelandan gazeton. Tamen ĉi-foje li aldonas atakon kontraŭ min.

Eble tio estas pli kuraĝa, sed ĝi certe estas malpli prudenta.

La cionisto Zamenhof konsilis "Ne prediku knabino al via avino"[1]. Mi avertas al Kamaĉo ne false akuzi pri kalumnio profesian juriston kiun vi kalumnias.

Nenie mi, nek S-ro Major diris la malcionismo estas antisemitismo. Tamen aliloke mi pruvis ke la fifama "Letero" kiun tradukis Kamaĉo estis ne kontraŭcionista

[1]*Proverbaro Esperanta* #1725.—Red.

aŭ kontraŭ la Israela registaro sed rekte kontraŭjuda.

Diri ke mi esprimis opinion ke iu ajn Islamano aŭ arabo estas kanajlo estus mensogo tro eta por Kamaĉo. Karakterize, li preferas uzi la Hitlere proponitan metodon de la Granda Mensogo dirante ke mi tenas tiun opinion pri la tuta arab-islama popolo. Kamaĉo finas sian atakon per la vortoj "Ĝis revido en Jeriĥo" kvazaŭ tiu loko estus fermita. Implica malverajo! Li povas iri al Jeriĥo (aŭ kiel oni diras angle "He can go to Jericho").

Rik Dalton

Mi opinias ke Georgo Kamaĉo (hispano) intencis aludon al la esprimo "Ĝis venontjare en Jerusalemo" per kiu finiĝas juda paska ceremonio kaj kiun oni tradicie komprenas kiel esperon ke Jerusalemo fariĝos vere libera denove. Same Georgo Kamaĉo esperas ke Jeriĥo fariĝos vere libera denove—esperon tenatan kaj de la Palestinanoj kaj de la Israela registaro.—Cetere, mi opinias ke ambaŭ verkintoj jam plene esprimis siajn opiniojn unu pri la alia. Ili bonvolu private interkorespondadi se ili plu volas daŭrigi la disputon.—Red.

Toleremo postulas multe. Ĝi postulas kuraĝon stari ĉe la flanko de malfortulo, kuraĝon pensi mem kaj ne kuri kun la granda aro. Ĝi postulas ne silenti dum ekstremistoj hurlas, ĝi postulas kontraŭstari la oficialan veron, ĝi postulas povon rekoni, kompreni kaj kontraŭbatali la kaŝe aperantan rasismon en si mem. Toleremo postulas kuraĝon esti homo.

Jukka Pietiläinen, en *Esperantolehti* 1/1994

ESPERANTO EN FILMOJ

Antaŭ pluraj monatoj mi legis, en la revuo *The Economist* de la 3-a de julio 1993, recenzon pri *Merchant of Dreams,* biografio pri la filmomagnato Louis B. Mayer, verkita de Charles Higham.

Mi rimarkis tie la jenan alineon:

"Before America entered the second world war, Mayer tailored MGM scripts so that they would not offend the Axis powers. Myrna Loy was cautioned not to criticise Hitler because there was still money to be made from the German Market. "Idiot's Delight", a film adapted from an anti-fascist play by Rogert Sherwood, was toned down lest Mussolini object and the language was changed from Italian to Esperanto."

La filmo *Idiot's Delight* ne troviĝas inter tiuj haveblaj ĉe la lokaj luigejoj. Tamen, dum lastatempa vizito al Sidnejo mi luprenis ĝin ĉe Video Ezy. La intrigo estas sufiĉe banala, sed plurloke la italaj kamparanoj kaj soldatoj ja parolas en Esperanto anstataŭ la itala.

Tio memorigis min, ke mi iam iuloke legis, ke ankaŭ Charlie Chaplin en unu el siaj filmoj (ĉu *The Great Dictator*?) uzis Esperanton anstataŭ nacilingvon aŭ -lingvojn.


Ĉu ekzistas aliaj similaj okazoj?

Ron Gates

*En **The Great Dictator** de Charlie Chaplin (en kiu Chaplin rolas kaj kiel juda persekutato kaj kiel Hitler!) la afiŝoj kaj surksribaĵoj estas en Esperanto, sed la dialogo estas nur anglalingva. La filmo estas tre amuza, kaj la karikaturoj de Mussolini kaj Hitler estas klasikaĵoj. Mi rigardis ĝin antaŭ kelkaj jaroj en Perto. Ĉu iu leganto scias pri alia(j) tia(j) filmoj?—Red.*

DIVERSAĴOJ

- ***Ni serĉas recenzanton*** por la libro *Almanako Lorenz—1994* eldonita de la Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, Brazilo. 143p. La recenzanto devas esti religikomprenema, sed senpartia kaj preta akcepti por la celo de la recenzo la premison de la aŭtoroj (spiritismon). Kiu bonvolos recenzi la libron, bonvolu kontakti la redaktoron de *ESK*.
- ***ILEI-konferenco:*** la 28a ILEI-Konferenco kaj la 3a gimnazio de ILEI okazos 30 Julio - 5 Aŭgusto, en Koreo, kun subteno fare de la Universitato Kangnam. Detalojn kaj aliĝilojn de Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-292 94 Hörby, Svedio.
- ***En La Skolta Mondo*** (4/93) aperis anonco ke: "La Nacia Reprezentantino de SEL en Aŭstralio Jennifer Dimo invitas al International Outback Adventure. Jennifer multe vojaĝis dum la lastaj jaroj kaj translokiĝis de la suda parto al la norda parto de Aŭstralio. Ŝi delonge estas lupidestrino kaj nun ankaŭ grupestrino." International Outback Adventure okazos en Alice Springs, 16 julio-4 aŭgusto kaj estos por 14-18jaraj geskoltoj. La suma prezo estas AUD$700. Informojn (skribu anglalingve) de Scout Association, Northern Territory Branch, GPO Box 1904, Darwin NT 5794. Adreso de Jennifer Dimo: 9 Rock Gully Road, Coominya QLD 4311. La ĉisuba artprentraĵo montranta la kunvenejon pentris Pauline Woods Nakmarra el la Pintiri-Awarpiri-tribo.



ESPERANTOLOGIA KONFERENCO EN LA UK EN SEULO

Temo: "Esperanto el Azia Rigardo"
Organizas: D-ro Bak Giŭan, Ho Song, Kim Uson, Lee Jung-kee.

Antaŭtagmeze oni aŭskultos prelegojn pri lingvistikaj studoj dum ĉ. 3 horoj; posttagmeze estos simpozi-forma diskutado, ĉ. 3-hora, pri ne pure lingvistikaj studoj.

Pri la enhavo de la konferenco la grupo raportos post la UK kaj ankaŭ eldonos ĝin.

Ĉiuj interesitoj estos bonvenaj kaj la grupo estas preta ricevi ĉiajn konsilojn kaj kunlaboron. Kiu deziras partopreni en la konferenco kiel preleganto aŭ simpoziano bonvolu kontakti la preparan grupon ĉe:
Korea Esperanto Asocio, CPO Kesto 4258, Seoul 100-642, Koreo, aŭ
Ho Song, Chamsil Chugong apt. 345-303, Chamsil 3 dong Songp'agu, Seoul 138-223, Koreo.

PROPONO PRI ESPERANTO-MEMORTAGO

DE MAX WEARING

Estus bone, se oni povus starigi Esperanto - memortagon, kiu farigos por esperantistoj tio, kio jam estas la 25-a de decembro por kristanoj, la 4-a de julio por usonanoj, kaj la 14-a de julio por francoj—nome, okazo por plifortigi senton de identeco kaj por allogi novajn adeptojn.

Movadanoj supozeble jam sentas tian bezonon: mi supozas, ekzemple, ke mi ne estas la sola eŭropdevena esperantisto, kiu embarasigas, uzante la eŭropan kristan/novjar-sezonon por elsendi bondezir-kartojn kaj novjar-raportetojn al gesamideanoj, kiuj havas alian (aŭ nenian) religion kaj tute alian novjartagon. Estus bone, se Esperantio havus sian propran universalan memortagon.

Mi kredas, ke la 26-a de julio, la oficiale aprobita eldondato de Esperanto en 1887 estas la plej taŭga por kapti la atenton de la ekstera mondo. Rememorante la titolon de la unua E-libro, oni povus nomi ĝin "Tago de Internacia Lingvo" (kompreneble ne "Tago de la Internacia Lingvo", kiu povus ofendi volapukistojn kaj aliajn). Eble en la nuna opiniklimato oni povus eĉ adoptigi la nomon inter internaciaj organizaĵoj kiaj Unuiĝintaj Nacioj kaj Eŭropa Komunumo.

Uzante tiun tagon por niaj ĉiujaraj personaj kontaktoj, ni povus rememorigi niajn konatojn (ne nur esperantistajn) pri la pliaĝigo kaj progresoj de la Esperanto-kulturo; kaj ni povus samtempe revigligi la tradicion de Tago de la Libro, disdonacante Esperanto-literaturaĵojn, Esperanto-informilojn kaj Esperanto-instruilojn.

Tiu tago povus fariĝi ankaŭ nia nove starigita Ago-Tago, kiu ankoraŭ serĉas regulan daton. Ĉar la 26-a de julio ofte okazas dum la plej granda ĉiujara renkontiĝo de esperantistoj, la Universala Kongreso, oni povus uzi ĝin por plifortigi la diskonigadon de tiu evento (kaj inverse).

Mi deziras al vi "Feliĉan Tagon de Lingvo Internacia, 1994, la 107-an naskiĝ-datrevon de Esperanto". Same mi deziros al parencoj, amikoj kaj kolegoj miaj tra la tuta mondo. Cu ankaŭ vi?

Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069, Aŭstralio.

FELIĈAN TAGON

DE

LINGVO INTERNACIA!

La 26-an de julio,
1994
Esperanto
havos 107 jarojn!

Gratulojn al Esperanto — la sola planita lingvo jam studita de pli ol 1000000 da homoj en pli ol100 landoj kaj akceptita kiel grava literatura lingvo! ❑

NZEA ESTRARANOJ DEMISIAS

DE BRIAN FOX

Du tre laboremaj Estraranoj demisiis de la Estraro de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Ĉe la Kongreso en januaro Ges-roj Jo kaj Derrick Knight diris ke ili petas liberigon de siaj pezaj postenoj kiel Sekretariino kaj Helpsekretario de NZEA, kaj en la Jarkunsido informis ke ili ne povos ĉeesti la venontan kongreson en Wellington en 1995 ĉar januaro estas la sola tempo kiam ili povos viziti sian familion en Aŭstralio kaj pasigi tempon kun ili.

Sed neniuj aliaj aŭklandanoj tiutempe akceptis la taskojn kaj Jo kaj Derrick pretis daŭre agi en la postenoj ĝis kiam la Estraro trovos personojn kiuj povos plenumi la rolon kiujn la Ges-roj Knight tiom konscience kaj sukcese plenumis. Nun S-ro David Rockell akceptas la postenon de Sekretario kaj S-ro Bradley McDonald agos kiel Helpsekretario. La Asocio estas dankema ke ĝi trovas tiom entuziasmajn samideanojn por daŭrigi la bonan laboron de Jo kaj Derrick.

Ges-roj Knight akceptis siajn postenojn en januaro 1988 kiam la Estraro translokiĝis de Wellington al Aŭklando. Dum ses jaroj ili montris sindonan laboremon por la plenumo de la multaj taskoj. Dum tiu tempo NZEA reverkis sian Regularon por respeguli pli sveltan membraron. Nov-Zelando aliĝis al la AEA libroservo kiun estras S-ro Tom Elliott. La arkivoj venis norden. La Estraro organizis du Strategiajn Planojn kun la profesia helpo de S-ro Tony Richardson. NZEA partoprenis en kunkongreso kun AEA en Sidnejo. AEA kaj NZEA kunligiĝas por la publikado de *Esperanto Sub la Suda Kruco* kun la klera redaktado de D-ro Donald Broadribb. Kaj nun ni uzas la Korespondservon per S-ino Betty Aulsebrook.

Ges-roj Knight multe laboris por certigi ke la ĉi-jara kongreso estis la plej internacia en Nov-Zelando kaj unu el la plej ĝuindaj. Novzelandanoj antaŭĝuas la Universalan Kongreson en Adelajdo en 1997, kaj pli frue nun organizas por la dua Anzek: Aŭstralia-Nov-Zelanda Esperanto-Kongreso, en 1996 en Aŭklando. En ĉiuj tiuj triumfoj la Ges-roj Knight ludis gravan rolon. La restantaj anoj de la Estraro de NZEA certe sentos la mankon de ili, kaj deziras al ili bonan sanon, ĝojplenan viziton al la familio en Aŭstralio, kaj multajn jarojn da Esperanto. ❑

E.W. "DON" CORNES

1908-1933

verkis Eric Fidler

La esperanta movado perdis longeservintan entuziasman esperantiston kiam forpasis la 20an de oktobro 1993 en Whangarei, Nov-Zelando, "Don" Cornes.

Li komencis lerni la internacian lingvon kiam li estis studento antaŭ multaj jaroj. Ekde tiam dum sia tuta vivo li estis entuziasmulo, kaj dum multaj jaroj membro de la Universala Esperanto-Asocio.

Multajn jarojn li estis delegito de UEA en Whangarei ĝis 1990 kiam pro malbona sano li devis eksiĝi el tiu posteno. En Whangarei sub lia gvido komenciĝis klubeto kiu kreskis grade ĝis post kelkaj jaroj la membraro nombris tridek geentuziasmulojn.

"Don" Cornes ĉiam propagandis la internacian lingvon. Pro liaj entuziasmo kaj eksperteco multaj personoj esperantistiĝis. Li estis amata de ĉiuj kiuj konis lin. ❑

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

estas komuna eldonaĵo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:
Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.
Vic-Prezidanto: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069.
Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109.
Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Membrokotizoj: AUD$30 por individuo, klubo, kc; $35 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso); $20 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto. Ĉiujn nomo- aŭ adreso-ŝanĝojn nepre sendu al la redaktoro: D-ro Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562, Aŭstralio.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:
Prezidanto: Brian Fox, 634 South Titirangi Rd., Auckland 1007. ☎ 9-817 8244.
Sekretario: David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. ☎ 9-270 3669.
Kasisto: Jackie Fox, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 1003.

Membrokotizoj: NZ$30 por individuo; $40 por geedza paro; $10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Kluboj po $1 por ĉiu ano, maksimume $15.

Ekster Aŭstralazio abono al *Esperanto sub la Suda Kruco* kostas 50 ned. gld., kio inkludas aerpoŝtan sendadon. Oni povas mendi la gazeton ĉe UEA; aŭ pagi en la konton ĉe UEA de la Libroservo de AEA, konto aeal-w, kun samtempa informo al la Libroservo de AEA. Oni povas mendi rekte de la Libroservo de AEA pagante per 34 IRK (aĉetitaj post februaro 1992), aŭ per bankĉeko en Aŭstraliaj dolaroj AUD$40; sendu rekte al la Libroservo de AEA. En Usono abono kostas US$28 kaj mendeblas ĉe ELNA.

Bonvolu informi la redaktoron: D-ro Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562, Aŭstralio, se via adreso estas neĝuste presita sur la adresslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian nomon aŭ/kaj adreson. Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. (☎ Aŭstralio 09 574 1307; fakso 09 574 1530.)

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 1994 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 1994 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita. Ĉi tiu numero de *ESK* estas perkomputile kompostita de Donald Broadribb, per Macintosh Classic II kun Sistemo 7 Pro, uzante Microsoft Word 5.1; kaj Apple OneSkanner kun Ofoto 2.0.

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Printed by Snap Printing, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 6101.